

Pri la « Plena Analiza Gramatiko de Esperanto »
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 463, 1981.03.19 & 21

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia Claude kaj Andrée Gacond.

La kvara eldono de la PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO, la plej grava frukto de la kunlaboro, kiu unuigis **Kálmán Kalocsay** kaj **Gaston Waringhien**, estas tutcerte grava evento, kiun ni atendadis jam ekde longe, enviante la posedantojn de la dua eldono de la jaro 1936 de tiu ĉi referenca verko. La tria eldono iniciatita de **Stefano La Colla** en 1957 estis interrompita de lia morto. Kun **Gaston Waringhien** ni diras, ke "granda estas la merito de la Estraro de UEA, ke ĝi entreprenis... la publikigon de jena kvara eldono", sed ni tuj aldonas, kaj ankaŭ granda estas la merito de **Waringhien** mem, ke malgraŭ la forpaso en 1976 de **Kalocsay**, li daŭrigis la perfektigadon de ilia komuna verko, eltirante la esencon de la lastjaraj verkoj pri Esperanto kaj pri ties gramatiko, enkorpigante ĝin en la koncernajn ĉapitrojn de la sescent-paĝa libro, kiun ni povas nun explore trafolii.

A.- Waringhien komencas la antaŭparolon al tiu kvara eldono veante pro la morto de sia verkofrato. Ni citas: "Tiu ĉi antaŭparolo estas subskribita, ho ve, de unu sola nomo: la malapero de mia verko-frato sentigas al mi, pli ol iam, kiom mi ŝuldis al lia genio kaj kiom pezas sur miaj ŝultroj la restanta tasko." (p. 14)

Cl.- Waringhien konservis al la verko ties kolektivan karakteron. Li "restis tre singarda, por ne meti sub" la nomon de Kalocsay opiniojn, kiujn lia amiko estus povinta ne partopreni. En la malmultaj lokoj, en kiuj li trovis utila esprimi propran vidpunkton, li ĉiam aldonis en la fino siajn inicialojn: G. W.

A.- "Jen do la lasta formo de tiu verko de intima kunlaborado, komencita en 1934 laŭ la instigo de Vilmos Bleier", la administranto de la revuo kaj eldonejo "Literatura Mondo". En ĝin Kalocsay kaj Waringhien metis la resumon de siaj konstantaj esploroj pri la lingvo de Zamenhof, Grabovski, Kabe kaj aliaj plej famaj aŭtoroj, kaj la plej bonan el ilia sperto de tradukistoj. La indekso de la referencitaj aŭtoroj mencias fakte cent dek nomojn, donante precizan ideon de la verkoj, kiujn Waringhien prikonsideris. El la nuna tempo ekzemple forestas ĉia mencio pri tiuj de István Szerdahelyi.

Cl.- Tiu ĉi indekso ankaŭ precize mencias la decidojn de la Akademio de Esperanto kaj de la Lingva Komitato. Faciligas la konsultadon de la libro ne nur la detala tabelo de la enhavo, sed ĉefe tre bone farita indekso de la temoj. Tre rapide oni trovas precizan instruon pri "kia estas la tradicia, klasika uzado pri ĉiuj punktoj de nia lingvo". Por reliefi, ke la celo de la "verko neniam estis la starigo de ia ajn teorio", sed strikta analizo de la "spirito de la lingvo, aludita de Zamenhof en lia letero al Boroko, kaj estis aldonita la adjektivo ANALIZA en la titolo de la verko: PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO.

A.- Ekde nun, kiel oni parolos pri la PIV, oni ankaŭ parolos pri la PAG. En la PIV ni informiĝas pri la leksika normo, en la PAG pri la gramatika normo. Ekde nun Esperanto posedas nediskuteble facile konsulteblajn bazajn instrumentojn, kiuj nepre troviĝu sur la ĉefbreto de la libraro de ĉiu esperantisto ema ne resti "eterna komencanto".

Cl.- Kiel Waringhien diras, konklude al la kvara antaŭparolo, "je ĉiu reeldono tiu Plena Gramatiko vekis kritikojn, ofte pasiajn, sed entute ĝi estis ŝatata kaj uzata de la plimulto... Malgraŭ la neeviteblaj mankoj, ĝi efike kontribuis, kaj... kontribuos plu, same kiel la "Plena

Ilustrita Vortaro" sur alia tereno, al la stabiligo kaj unuecigo de nia lingvo, nenion deprenante de ĝia fleksebleco."

A.- Ĉiu reeldono ebligis asimili la esencon de la novaj studoj kaj konsideri la kritikojn, kiuj montriĝis pravaj. El tio la ekvilibro de la libro, kiu restos ankoraŭ dum longa periodo sen konkurenca verko, ĉar je la horizonto de Esperanto nenio anoncas la publikigon de pli kompleta gramatiko. Kritikoj tutcerte refoje esprimiĝos en precizaj recenzoj aŭ eseetoj, sed ĝis kiam ili komkretiĝos en verko simile ekvilibrata, ni povos ankoraŭ longe konsulti la PAG-on.

Cl.- Laŭ citaĵoj el la antaŭparolo al la dua eldono ni diros kelkajn vortojn, pri la reago de Kalocsay kaj Waringhien al la kritikoj, kiujn la unua eldono en 1934 vekis. Tiuj citaĵoj vipu nian legemon de la verko:

A.- "Se ni malakceptis kelkajn (kritikojn), ni tion faris - oni bonvolu kredi - ne el blinda memestimo, sed el seriozaj motivoj... Oni riproĉis, eĉ akre, pri nia malfideleco al la Zamenhofa lingvo. Nu, sufiĉas trafolii la libron por konstati la malon: preskaŭ ĉiun regulon ni ilustris per Zamenhofa ekzemplo; pri ĉiu duba punkto ni konsultis lian lingvuzon. La ĉefa utilo de la verko estas ĝuste, ke ĝi ebligas tuj informiĝi, kiel Zamenhof solvis iun demandon. (p. 10)

Cl.- "Ni tenis nin tiel konsciencie al ĉi tio, ke aliaj nin akuzis pri "Zamenhofa snobismo". Sed ni devis ja konstati la fakton, ke la nuna lingvo en kelkaj punktoj ne sekvas la Zamenhofan uzadon; kaj ni ne povis ne aprobi tiujn **vivantajn** formojn, kiuj al ni ŝajnis pli logikaj kaj oportunaj. Plejparte temas pri malgravaĵoj..." (p. 10)

A.- "Oni riproĉis al ni la komplikecon. Nu, ĝi estis neevitebla. Por pritrakti detale vivantan lingvon, oni devas ĝin aranĝi en kadroj, se oni ne volas fali en ĥaoson de neligitaj, splitaj rimarkoj. Krome, ĉar temas pri internacia lingvo, ni devis forgesi ĉiujn naciajn sistemojn kaj konstrui ian absolutan gramatikon bazitan nur sur la racio. Ni devis do fari sisteme la tutan skeleton de la homa lingvo por meti sur ĝin la vivantan karnon de Esperanto. Sed tio eblis nur ĉe zorgega difinado de ĉiuj vortspecoj kaj funkcioj. (p10)

C1.- Fine de la libro, eldonista noto diras, ke la **PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO** estis kompostita de Intelekso, Brazilo, enpaĝigita kaj fotografita en la Grafika Centro de UEA, Belgujo, kaj presita en Ĉina Popola Respubliko. Tiu internacia kunlaboro, kiu ebligis la eldonon de PAG, estas simptoma de la hodiaŭa universaleco de nia lingvo. Povu la PAG esti instrumento, kiu larĝe kontribuu al la konservado de la unueco de la zamenhofa lingvo. Kaj se ni ne povas sekvi en ĉiuj detaloj la gramatikan nomenklaturon kaj la klarigojn donitajn en la **PLENA ANALIZA GRAMATIKO**, ni neniam forgesu, ke kiel la **PLENA ILUSTRITA VORTARO**, ĝi ne estas nova **FUNDAMENTO**, sed nur meditiga diskutbazo, konsultinda referencilo.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond anoncis la eldonon fare de UEA de la **PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO**. Ĝis reaŭdo!